Aŭstraliaj Esperantistoj

Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj
Nia Espero Nia Forto

Novaĵletero de **Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj**
NI SENDAS AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KUN KONATA RETADRESO
http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

auto 15/10/2012 Sepdeka Eldono 2012 26/07/2012 SENDITA

Mallongaj Informadoj, Diskutoj, Sugestoj, de vi kaj ni.
Se vi trovas bonan informon, informu Aŭstraliajn Esperantistojn.

Ni invitas ĉiujn Esperantistojn kontribui al tiu novaĵletero.
Preferas mallongan leteron, pri kaj en Esperanto, kun via nomo.
Vi respondecas pri ĝia enhavo.



Pensu!
Kritiku!
Laŭdu!
Skribu!
Progresu!

Tiu ĉi letero havas "hiperligilojn" al retpaĝoj KLAKU! KLAKU! KLAKU!

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rspring@tpg.com.au;

Provlegita de Nicole Else

La informaj paĝoj kaj nomoj nur aperos en la dekaj eldonoj

GRAVAJ DATOJ vidu Tamen Plu de Bob Felby

DONALD BROADRIBB mortis la 13an de oktobro 2012

Liz, la edzino de Donald Broadribb, ĵus informis min, ke Don forpasis en la fruaj horoj de ĉi-mateno. Aliaj detaloj ankoraŭ ne haveblas. Estas granda ŝoko kaj malĝojo por mi; nur lastan semajnon ni interŝanĝis komentojn pri la enhavo ktp de Mirmekobo 21. Mi scias, ke ankaŭ estos malgajiga novaĵo por tiuj el vi kiuj konis Don, kaj kiuj komprenas la gravecon kaj grandecon de la manko por Esperanto, pro lia forpaso. Li ripozu en paco, post vivo plenplena je ege valoraj atingoj, malgraŭ ankaŭ plenplena de tiom da malĝojo. Al Liz kaj al lia filino, Chris, mi sendas miajn elkorajn kondolencojn. Vera Payne.

From: Osmo Buller <mailto:direktoro%40co.uea.org>
Date: 2012/10/14
Subject: N-ro 475 - Gazetaraj Komunikoj de UEA
==============================**===============================**=====
FORPASIS DONALD BROADRIBB (1933-2012)

Honora Membro de UEA, d-ro Donald Broadribb forpasis la 13-an de oktobro.
Li naskiĝis en Usono sed ekde 1974 vivis en Aŭstralio. Broadribb studis filozofion, teologion kaj lingvistikon en Usono kaj Aŭstralio kaj psikanalizon en Svislando. Li esperantistiĝis en 1946 kaj membriĝis en UEA en 1950. Li redaktis plurajn Esperanto-gazetojn: "Kristana Bulteno" en Usono en la 50-aj jaroj, "Nord-Amerika Esperanto-Revuo" (1959-62), "Biblia Revuo" (1964-72), "La Nigra Cigno" (bulteno de Esperanto-Ligo de Okcidenta Australio, 1980-88), kaj "Esperanto sub la Suda Kruco" (1989-2008).
En 2008 li fondis la retrevuon "Mirmekobo" (mirmekobo.com), de kiu ĝis oktobro 2012 aperis 21 numeroj. Kun G. Rust li kompilis "Terminaro de bibliaj studoj" (1973). En 1967 li kunfondis ĉirkaŭ "Biblia Revuo" Internacian Asocion de Bibliistoj kaj Orientalistoj.

Broadribb estis grava tradukisto. Krom du verkoj de Platono, "La respubliko" kaj "Kratilo" (la unua el kiuj gajnis la OSIEK-premion en 1995), li esperantigis "Alico en mirlando" kaj "Trans la spegulo" de L. Carroll, "La mirinda sorĉisto de Oz" (L. Frank Baum), "Eposoj el Antikva Ugarito", "Mil naŭcent okdek kvar" (G. Orwell), kaj plurajn tekstojn el la Mortmaraj rulaĵoj "Qumran". Amaso da artikoloj kaj tradukaĵoj el lia plumo aperis en diversaj Esperanto-gazetoj ekde 1948. Broadribb estis membro de la Akademio de Esperanto (1972-81 kaj 1992-2001) kaj juĝanto pri prozaĵoj ĉe la Belartaj Konkursoj de UEA (ekde 1995). Rekone pro liaj meritoj Aŭstralia Esperanto-Asocio donis al li la titolon "Fratulo" en 1996.
En la 82-a UK en Adelajdo en 1997 li estis nomumita Honora Membro de UEA.
Trovis kaj sendis Nicole

Parto kun hiperligiloj
Klaku! KLAKU!




AŭSKULTU, LEGU ESPERANTAN RETRADION TAGE

Informaj rakontetoj, Bona lingvo, Malmultaj minutoj.
Plibonigu vian Esperanton
http://members.aon.at/aldone/peranto/index.html
Televidilo gravas por malriĉuloj 15/10/2012
La projekto „Plurlingva alfabetigo“ 13/10/2012

BRISBANAJ FOTOJ FOTIS CRYSTAL HILL

Saluton al ĉiuj!

Jam estis pluraj rakontoj pri la lastatempa Aŭstralia Esperanto-Kongreso en Brisbano, do mi nenion plue diros pri tio, sed mi volas sciigi ĉiujn pri miaj fotoj de la evento, kiuj

FINFINE pretas! Mi pardonon petas pro la malfrueco, sed kiel oni diras angle: "pli bone malfrue ol neniam", ĉu ne?

La fotoj troviĝas ĉi tie:
https://www.dropbox.com/sh/grm8uh2c65fequd/vbWM4_CPWp



Tie oni povas trarigardi kaj elŝuti la fotojn. Se vi deziras havi pli grandan kopion de iu foto, bonvolu kontakti min ĉe nighstar@gmail.com Mi ankaŭ havas kelkajn filmetojn, kiujn mi eeeeble alŝutos al YouTube poste....

Amike, Crystal Hill

Mia plej nova filmeto: **Ingrid Piller parolas pri lingvaj problemoj (en la angla) kaj pri la retejo languageonthemove.com Nicole**
http://www.youtube.com/watch?v=goqYnsCstjs

Mia kontribuo al Mirmekobo

En marto 2010 aperis en Mirmekobo artikolo kiun mi mem verkis. Elŝutu ĝin ĉe http://mirmekobo.com aŭ legu ĉe http://www.ipernity.com/blog/158659/421952
La titolo estas *Kiel pli efike diskuti dum kunveno, kiel pli bone pensi?* Temas pri la ideoj de Edward De Bono. Eble AEA povus uzi tiun metodon en la venonta jarkunveno.
Amike, Nicole

Aŭgusto 8an 2012 kvar koreoj inventis novan elektran baterion uzatan de elektraj aŭtoj kiu bezonas nur 60 sekundojn por ŝarĝi
Estas mondŝanĝa eltrovo Money Morning 14/10/12 Roger Springer

KLUBNOVAĴO







La Manlia Esperanto Klubo kunvenos la 3an de novembro. Ĉiuj bonvenaj



EFNSK Jarkunveno en Esperanto Domo
dimanĉon la 28an de oktobro 11atm ĝis 12 ptm
BBQ lecionoj filmetoj sekvos je 12ptm ĝis proksimume 4ptm

Ĉiuj bonvenaj.



Central Coast Esperanto Club

kunvenis Sabaton 2ptm 10 Nov 2012 Bamboo Buddha Café
221 Wattle Tree Road, Holgate NSW 2250

Ĉu via klubo kunvenis? as? os?



Maldetala informo sufiĉas. Skribu al AE rspring@tpg.com.au
Sendu desegnon aŭ foton taŭgan por via grupo kun malgranda raporto



METU VIAN KLUBAN INFORMON ĈI TIEN



AEA Informas

AEA estraro kunvenis 11/10/12 vidu AE79

LETEROJ mallongaj de la legantoj



Malpli ol duona paĝo

Dankon Roĝer pri anonco de la morto de Donald Broadribb.
Mi esprimas mian sinceran kondolencon al la familio.
Grandega perdo por Esperanto Svetislav Kanaĉki

LETEROJ IOM LONGAJ



Pli ol duona paĝo

3ZZZ 92.3FM

Antaŭ 23 jaroj –monato julio 26-1989 Esperanto radio programo, je 3zzz 92.3fm okazis la unua Esperanto radio voĉo kaj aŭdeblis pere de radioondoj en Melburno kaj ĉirkaŭaĵoj en radiuso de 100 kilometroj. La voĉo de lingvo Esperanto. Ĝi tiam

daŭris nur 15 minutojn, estis prezentita amatorece kun espero ke eble ne estu la unua kaj lasta fojo. Feliĉe ĝi jam daŭras 23 jarojn.

Ne estas multaj kiuj scias pri ĝiaj komencaj jaroj kaj la problemoj.

3zzz radiostacio ĉiujare invitas aŭskultantaron de ĉiuj nacioj kiuj havas sian nacilingvajn programojn, helpi finance pere de RADIOTON. Do ĉar Esperanto estas parto de ĝi, ni ankaŭ respondecas por kolekti sumon de 1000 dolaroj ĉar ni havas unu horan programon. Estis indiko en 79a No de Aŭstraliaj esperantistoj, ke estas dezirinde skribi pri klubaj agadoj. Ĉu radio 3zzz programoj de Esperanto rajtas prezenti sian temon, nun kaj estonte? Se jes, mi kiel fondinto de la Esperanto radio programo, mianome petas geesperantistojn kaj simpatiantojn helpi finance. Donacu laŭ via plaĉo kiom ajn por tiu celo.

Tre gravas, se vi sendos donacon, ke vi skribu ne nur vian nomon, sumon sed ankaŭ la vortojn: radioton Esperanto-programo, tio certigos ke la donaco iros al la Esperanto sekcio de la radio. Sendu al Henri Broadbent 63,Kennedy Road Somers 3927. Anticipan dankon al ĉiuj donacontoj,

Svetislav Kanaĉki stevskank@hotmail .com

ĈU ESTAS CO_2 DANĜERA MALPURIĜO ?


Vi trovos ke klimata ŝanĝo estas realo kiam vi vidos la registrojn en glaciaj koroj, koralaj koroj kaj teraj koroj, kiuj elmontras, ke en la pasinteco la vetero estis pli varma kaj pli malvarma, pli seka kaj pli malseka. Ankaŭ en la pasinto la CO_2 niveloj estis pli ol dekobloj pli altaj ol nuntempe.




CO_2 estis deklarita la plej granda kaŭzo de la venonta klimato-katastrofo, tamen, CO_2 estas necesega parto de vegetaĵa fotosintezo, per kiu la klorofilo en plantoj faras la planthiston el kombinaĵo de CO_2 kaj aliaj elementoj.

Ni scias ke CO_2 estas necesega por ĉiu vivaĵo, ĉar sen CO_2 en sufiĉe alta nivelo vegetaĵo ne povus kreski, kaj la vivo de animaloj incluzive homoj dependas de plantoj, kaj la vivo de plantoj dependas de CO_2.

Nuntempe la CO_2 koncentro en la aero estas ĉirkaŭ po 388 partoj en miliono – ĉi tio estas malalta koncentro-periodo. Dum la erao de la





dinosaŭroj CO_2 superis 2000 partojn en miliono kaj antaŭ la lasta glacio-aĝo ĝi superis 4000 partojn en miliono. Nia spiro kiun ni elspiras enhavas

ĉirkaŭ 40 000 ppm da CO_2. Tio estas kvar procentoj.
Pliigitaj niveloj de CO_2 iniciatas pli bonan planto-kreskon – malpliaj niveloj malpliigas la kreskon kaj estas nivelo en kiu nenio kreskas. Plantoj faras nur etan kreskon je 200 ppm. Kie ajn plantoj estas kreskigataj en komercaj varmejoj sub vitro, en vitrodomoj tie estas komerca praktikado aldoni CO_2 al la aero por subteni ĉirkaŭ 1000 ppm, kaj en la ĉeesto de lumo la planto-kresko estas tre pliigita.
Ne estas pruvo, ke pli da CO_2 ŝanĝas la veteron. Estas nur la opinio de misinformitaj politikistoj. Ni rigardu CO_2 inteligente ! Ĝi estas nek venena nek danĝera, sed unu el la tre gravaj kaj eĉ esencaj ingrediencoj en la teksaĵo de vivo. Sen CO_2 ne estas vivo sur tero !



Korajn bondezirojn, Erhard. (Brisbano)

Saluton Ge-Esperantistoj,

Espereble vi ĉiuj havis mirindan tempon ĉe la ĵusa AEA Kongreso. Kiel oni diras: A cynic knows the price of everything but the value of nothing (Cinikulo scias la prezon de ĉio sed la valoron de nenio) Paroli Esperanton estas nur la elirpunkto por realigi la esperojn de nia amata Ludoviko Zamenhofo, nome por helpi en la starigo de gefrateco de la homaro.

Nun, en Aŭstralio ni estas tiel malgranda grupo de esperantistoj, kiuj devus havi neniun problemon kunigi en komuna celo. Tio antaŭkondiĉas, ke ni estu sufiĉe maturaj por subpremi niajn egoísmajn tendencojn kiam ni interkonsultiĝas por antaŭenigi la Esperanto-aferon. La celo de konsultado - kiel ĉe nia Kongreso en Brisbano - estas doni al ĉiu oportunon kontribui per travidebla kaj sen antaŭjuĝa diskutado. Konsultado devas okazi en sinteno senpartia. Oni devas lerni esprimi opiniojn sincere, trankvile, sen pasio kaj sen kolero. Membroj devas lerni sen ofendiĝi aŭskulti la opiniojn de aliuloj kaj neniam malgravigi la opiniojn de aliuloj. Tio necesigas iom da matureco, kaj multe da morala kuraĝo kaj humileco (nur prenu la ekzemplon de amata doktoro Zamenhof)!

And when a word "*burns" on your tongue - let it burn!* Kaj kiam la vorto "brulas" en via lango - ĝi forbruliĝu! (mi ne certas, ke mi bone esprimis tion) Por reteni unuecon ni ĉiuj obeu la majoritatan decidon. Kaj, eĉ se decido iras kontraŭ niaj personaj deziroj kaj eĉ se la plimulta decido estas erara ni unuanime sekvu eraran decidon anstataŭ ol insisti je la ĝusta decido kaj tiel krei konflikton, disecon, antagonismon ... Finfine la erara decido estos ĝustigita, ĉar laborante kune, ĉiuj povas vidi kiam ŝanĝo estas necesa.

Memoru: Neniu estas perfekta! Ni vivas en malperfekta mondo! Ni ĉiuj servas Esperanton kiel volontuloj. Bonvolu, ne esti juĝemaj!

Fine, ni dankas la eksiĝintan Estraron kaj ties dediĉitajn kunlaborantojn por la laciga laboro jaron post jaro kaj ni deziras ĉion plej bonan al la nova Estraro. Ili ĉiuj ricevos nian lojalecon kaj apogon en siaj diskutoj.

Amike

Petro & Linda Danzer, BES

Kiam oni ne informas, onidiroj plenigas la mankon da informado

Skribu, informu 198 retadresaranojn de AE pri viaj novaĵoj



The English Section





mallongaj mesaĝoj por novuloj



La AE informaj kaj nomaj paĝoj sekvas

Listo de individuaj ricevantoj de Esperantaj elsendaĵoj en la adresaro de Aŭstraliaj Esperantistoj.

First name	Family Name	Dale	McManus	Hugh	Malcolm	Margaret	Chaldecott	Robert	Budzul
Abid	Afridi	Dana	Diggles	Ian	McArthur	Margaret	Yue	Robert	Hoogenboom
Alan	Bishop	Daniel	Forrest	Ian	Green	Margarita	Pavlova	Roger	Hill
Alan	Mendelawitz	Daniel	Kane	Ian (Jano)	Wylles	Marika	Fox	Roger	Springer
Alan	Turvey	Danton	Black	Indrani	Beharry-Lall	Marina	Lobanova	Ronald	Gates
Alan	Collinson	David	Astle	Ivan	Heldzingen	Marjorie	Johnson	Sandor	Horvath
Alan	Dean	David	Dalgleish	Ivan	Pivac	Mark	Pavic	Sandor	Monostori
Amy	Regal	David	Kidd	Jaga	Oprzedek	Mark	Smith	Sandra	Connors
Andrew	Adams	Dennis	Murphy	James	McElvenny	Martin	Gray	Shane	Leddin
Andrew	Lutz	Dianne	Lukes	Jay	Mooney	Marumi	Smith	Shayne	Power
Andrew	Voutsis	Dianne	Mitchell	Jennifer	Birchall	Mary	Mills	Shirley	Gradussov
Andrew	Spannenberg	Dmitri	Lushnikov	Jenny	Bishop	Matthew	Maguire	Shresta	Kishor
Angela	Maag	Dorothy	Bysouth	Jim	Radford	Matthew	Meldrum	Sibel	Lewis
Anne	Sanders	Dzejlana	Haveric	Jo	Turvey	Max	Wearing	Sidney	Wolfson
Anthony	Gaskell	Edith	Mejia	Joffre	Bell	Michael	Waters	Simon	Gelin
Barbra	Treharne	Edna	Watson	John	Abood	Mick	Gallagher	Stephen	Landman
Barrie	Cledsmith	Elizabeth (Libby)	Mortimer	John	Adams	Mike	Taggart	Stephen	Pitney
Barry	Healy	Elrae	Adams	John	Forbes	Miranda	Lutz	Svetislav	Kanachki
Benjamin	Hook	Erhard	Claus	John	Gallagher	Nancy	Roy	Szymon	Gryg
Beth	Wearing	Erin	McGifford	John	Massam	Nicole	Else	Terry	Manley
Beth Maree	Shields	Esther	Parris	John	Garvey	Owen	Loneragan	Thomas	Karpiniec
Blaze	Doric	Finnur	Larusson	Jonathan	Cooper	Pamela	Fenton	Thomas	O'Gliasain
Bob	Felby	Franciska	Toubale	Jonathan	Moylan	Patricia	Palmer	Tim	Stackpool
Brendan	Linnane	Fujun	Xiao	Jorge	Gallegillos-Pozo	Patrick (Lize)	Zhang	Tim	Warren
Brian	Dance	Gerry	Phelan	Kam	Lee	Paul	Desailly	Tom	O'Grady
Brodie	May	Giles	Thomson	Katja	Steele	Paul	Gorny	Trevor	Steele
Carol	Lutz	Glyn	Truscott	Kay	Andersen	Paul	Green	Trish	O'Connor
Caroline	Turner	Gordon	Coleman	Ken	Rolls	Penny	Vos	Vera	Payne
Catherine	Chen	Grace	Alvarez	Kep	Enderby	Peter	Bird	Vicky	Crickett
Cathy	Taggart	Gus	Faith	Kerry	Robson	Peter	Danzer	Volo	Gueltling
Chan	SY	Hazel	Green	Kevin	Warburton	Peter	Mitchell	Yaw	Badu
Charles	Stevenson	Heather	Furby	Kiah	Morante	Philip	Nichols	Yvan	Serve
Cho	Kyung-Mi	Heather	Heldzingen	Kirsi	Rossi	Philip	Smart	Yvonne	Harvey
Chris	Krageloh	Helen	Webb	Laurie	Kirwan	Rainer	Kurz	Bradley	McDonald
Christine	Holliss	Helen	Palmer	Lev	Lafayette	Rees	Pearse	David	Dewar
Clivia	Frieden	Henriette	Vanechop	Linda	Fields	Renjo	Oren	David	Ryan
Colin	Giles	Henry	Broadbent	Lucien	Giloteaux	Richard	Delamore		
Colin	Robinson	Herve	Diviciacos	Marc	Schmidt	Richard	Marcus		
Crystal	Hill	Howard	Gravatt	Marcel	Leereveld	Richard	Penman		

La noma listo de "Aŭstraliaj Esperantistoj" havas homojn kun konata nomo kaj retadreso.

Se vi deziras ke via nomo estu sur tiu listo de ricevantoj, abonu! rspring@tpg.com.au

Se vi deziras ke via nomo ne estu sur tiu listo de ricevantoj, malabonu!

Se vi deziras ke nomo de familiano estu sur tiu listo de ricevantoj, informu min.

Mi povas krome plusendi mesaĝon al individuo kiu estas en la supra listo.

Mi ne donas adresojn al petantoj.

Viaj leteroj al AE, devas montri vian nomon kaj se vi deziras, retadreson se vi akceptas, ke ĝi estu montrata post via letero.
Mi ne aldonas iun ajn retadresojn se la skribanto ne mem faras tion.

Ĉu vi ŝanĝos vian retadreson? Informu min. rspring@tpg.com.au;

La adresaro de "Aŭstraliaj Esperantoj" estas uzata krome por sendi Tamen Plu, Telepeon, urĝajn anoncojn kaj se vi deziras vian bonan ret-gazeton al ĉiuj homoj listigitaj en la adresaro de Aŭstraliaj Esperantistoj.

La ‚Aŭstraliaj Esperantistoj' (AE) publikigas vidpunktojn en Esperanto, sendepende ĉu vi estas membro de kluboj aŭ asocioj.
Skribu al ĉirkaŭ 200 legantoj, en Esperanto mi petas.

La Novaĵletero Aŭstraliaj Esperantistoj estas elsendata almenaŭ unufoje semajne

La novaĵletero 'Aŭstraliaj Esperantistoj' subtenas liberan sinesprimon kaj honestajn kaj senkaŝajn artikolojn. Sed ni rezervas la rajton modifi aŭ forigi viajn komentojn se ni konsideras ilin esti ofendaj aŭ tro malrespektaj. Ni nun provlegas ankaŭ la leterojn kaj korektas la mistajpojn kaj gramatikajn erarojn.

Se oni prokrastas ĝis perfekteco, oni faras nenion, ĉar la morto atendas vin.
Ne Ĉagreniĝu! sed Parolu!, Skribu!,

Interesaj faktoj

Mezura sistemo havas metran logikan facilan sistemon ekde 1795.
Lingvoj havas logikan facilan Esperanton ekde 1887.

Muziko havas bekflutojn (school recorders) por instigi studentojn lerni pri muziko.
Lingvoj havas Esperanton por instigi studentojn lerni pri lingvoj.

Esperanto estas la 27a lingvo en la listo de lingvoj laŭ nombro de artikoloj en Vikipedio (entute 285 lingvoj estas uzataj tie).

Senpaga Freelang vortaro estas tre uzinda kiam vi skribas, legas per komputilo
Plena Ilustrita Vortaro (PIV) estas surrete. http://vortaro.net/

Uzu Esperantajn literojn Por vindozaj komputiloj. Ek! aŭ Tajpi

La epoŝta programo *"gmail"* de Google transsendas la esperantajn literojn tute bone

La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ 5 minutan aŭskult/legon tage.

Nun vi povas lerni ankaŭ Esperanton per **lingibli.** http://eo.lingibli.com/

Kurso de **Esperanto** - Main page http://www.kurso.com.br/index.php?en

lernu! - Learn **Esperanto** online. Live tutors, dictionary, books & music **lernu**.*net/*

Rekomendata Legado

"*Mirmekobo*," de Donald Broadribb mirmekobo.com
"Tamen Plu" de Bob Felby Ni sendos kopion al niaj konataj retadresoj
"Telopeo" de EFNSK Ni sendos kopion al niaj konataj retadresoj
"Esperanto sub la Suda Kruco" AEA www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
Via kluba Novaĵletero? Laŭ peto, ni sendos retkopion al niaj konataj retadresoj
la Esperanta Retradio retpaĝo por aŭskulti kaj legi Esperanton
http://ckuik.com/Esperanto Eniro je Multegaj Esperantaj videoj de Jutubo
http://www.bookbox.com/ La rakontoj estas laŭtlegataj de diversaj personoj
Traduku anglan al Esperanto senkoste aŭ google tradukilo

La gastĉambro de EFNSK devas esti antaŭmendita de estontaj gastoj. Neniuj Esperantistoj loĝas tie aŭ proksime por helpi gastojn, kiuj ne antaŭmendis. Se eble antaŭmendu almenaŭ 2 semajnojn antaŭe. Tio helpas nin por prepari la ĝastĉambron.

Skajp-anoj, metu vian adreson ĉi tie. Skype name Mary Grace Mills (Orange nsk)



Skribu al AE
en Esperanto

